




# Esperanta Vorto

Oběžník kroužku esperantistů
při Újezdní osvětové besedě
v L a n š k r o u n ě

9

Cirkulero de Esperanto-Rondeto
ĉe Distrikta kleriga kunularo
en L a n š k r o u n

FEBRUARO 1952 / II-a j. /




## 1 – an de marto al PARDUBICE

JUNULARA KONFERENCO DE REGIONO LANŠKROUN okazos la 1-an kaj 2-an de marto 1952 en PARDUBICE.

SABATE je la 19-a horo en kultura ejo de stacidomo – programo „Junularo amuzas sin“.

DIMANĈE je la 9-a horo denove en Kultura ejo – laborkunveno.

Pluaj datinformoj estas sur la dua paĝo.

Ankaŭ IV alvenu ekkoni agadon de nia Esperanto Junularo.

Kuraĝigu nin partoprenonte !!

Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ Λ

OBLASTNÍ KONFERENCE JUNULARA V PARDUBICÍCH se bude konat 1. a 2. března t.r. / v Kulturní místnosti na nádraží /.
Do 21. února oznamte, jakým způsobem přispějete sobotnímu večírku, jehož začátek je stanoven na 19 hodin.

Rovněž do 21. února si napište o nocleh ve společné noclehárně nebo v hotelu.
Pracovní schůze bude v neděli 2. března v 9 hodin.

Pište na ADRESU: Karel Franc, Okrouhlík 811, PARDUBICE II.
Delegáti, připravte si hlášení o činnosti vašeho Junulara v roce 1951, v lednu a únoru 1952 a o plánu do budoucna!

Nádražní kulturní místnost v Pardubicích je v 1. poschodí.
Ĝis la revido en Pardubice! Jun.repe.

- o – O – o -

Por regiona biblioteko ni ricevis librolistojn de Esp. Klubo Hradec Králové, Pardubice, Lanškroun kaj de D-ro Fousek el Přelouč. Listoj estos dissenditaj post Konferenco en Pardubice.

## E.J. raportas

DOLNÍ ČERMNÁ – Kursoj de Esperanto baldaŭ finiĝos – restas nur tri lastaj lecionoj. Kurso-A okazas ĉiulunde de la 6-a ĝis 8-a horo, kurso-B / por mezlernejo / ĉiumerkrede de la 5,30 ĝis 7,30. Niaj taskoj en estonteco: fondi E-klubon kaj trovi konvenan ejon por regulaj kunvenoj.

Karel Štěpánek

HRADEC KRÁLOVÉ – Nun niaj junularaj kunvenoj denove reviviĝis, kiam ni eksciis pri la okazonta konferenco de junularo en Pardubice. Do, ni nun kunvenas regule ĉiuvendrede de la 18-a horo en nia klubeejo / kie ni ĉiam tre bone hejtas / en pli granda nombro, almenaŭ dek gejunuloj. Tam vizitas nin iu el pli aĝaj s-anoj / kiel s-ano Pytloun ktp. /. Al Pardubice aliĝos de ni eble 5 aŭ 6 kaj ni eble prezentus iun malgrandan programeron, por ke oni ne diru pri ni, ke ni tute ne vivas.

L. Rejthárková

LANŠKROUN – En januaro 22 kursanoj faris ekzamenojn, kiuj konsistis el tri jenaj partoj: Skriba traduko de 10 ĉeĥaj frazoj en Esperanon; 5 demandoj pri rilatoj de kursanoj al lingvo, movado kaj al pasintaj kursoj; konversacio pri temoj el lernolibro de Inĝ. Krajíc. 8 kursanoj estis eminentaj, 11 tre bonaj kaj 3 bonaj. Kelkaj ne kuraĝis ekzameni. - Januare ni aranĝis 3 kunvenojn ĉiam vendrede de 19-a ĝis 21.30. La programoj konsistis el amuzaj kaj instruaj partoj. La kantado estis akompanata per mandolino kaj harmoniko. Ni ludis diversajn sociajn ludojn kaj babilis pri novaĵoj en la movado. Krom tio ni legis E. Gazetojn, cirkulerojn kaj artikolojn en lernolibro de Kilian kaj rakontis enhavon. Ni ankaŭ ĉiam ellernis unu ĉapitron de la gramatiko kaj konversacio.
- 3 s-anoj partoprenis regionan laborkonferencon en Olomouc 1a 5-an kaj 6-an de januaro.

Luboš Kretzschmar

PARDUBICE – Multaj tagoj kaj monatoj pasis, sed fine alproksimiĝis tago, kiam ĉe ni estis fondita „Junularo“. Oni skribis la 16-an de januaro 1952, kiam 9 anoj voĉdone decidis fondon de Junularo. Plimulto de ili estas gelernantoj de la aŭtuna kurso, kiu sukcese finiĝis la 19-an de decembro 1951, kaj ĉi tiuj geanoj restis fidelaj al nia verda familio. - 23-an de januaro 1952 ni aranĝis kurson por komencantoj, kiun vizitadas 27 gekursanoj, precipo junaj. Multaj taskoj kuŝas antaŭ ni, sed ni esperas, ke kun helpo de ĉiuj anoj ni ĉion bone plenumos.

Delegato: Karel Franc, Okrouhlík 811, Pardubice II.

VL.VYHLÍDKA el PRAHA – Vian konferencon ĉeestos 8-10 ges-anoj el Praha. Mi ankaŭ skribis el Ostrava, postulante Ostravanoj, ke ankaŭ Junularo Ostrava ĉeestu vian konferencon. Se vi volus okaze de konferenco aranĝi la Esperantan ekspozicion, reskribu tuj. Ni alportos ĝin kune! Temas pri migra Esperanta ekspozicio, kiu jam estis aranĝita en Železárny Kladno /la 10-an de januaro 1952 / kaj tiun ĉi dimanĉon estos aranĝita en Kralupy. En Kladno ĝin ekvidis 250 vizitantoj. Ĉu tio ne estas sukceso? Tamen malgranda, sed al ni sufiĉas, ĉar: Eĉ guto malgranda konstante frapante . . .

TŘEBÍČ – Našu lednovou činnost lze shrnout v tyto body:

1. Dne 1.ledna jsme vydali 1. číslo našeho časopisu „FRATECO“. Články byly většinou české, ale v druhém čísle bude již tato chyba napravena. Chceme, aby obsah časopisu byl co nejhodnotnější a proto vás žádáme, mladé samideány, o literární příspěvky, po př. konstruktivní kritiku.
2. Kursy esperanta ve skupinkách pokračují s úspěchem.
3. Z ciziny dostáváme 9 esp. časopisů výměnou za náš. - Podrobná lednová činnost bude uveřejněna v únorovém čísle „FRATECA“.

del. Gottfried

VÝPRACHTICE – Junularo Výprachtice kunvenas ĉiun lundon je la 6-a vespere en klubejo de ČSM. L. Jer.

- o – O – o -

JUNULARA KUNVENO -

V.Novobilaký: . . . Skribu pri via preparo de kunvenoj, ĉar tio estas unu el la plej efikaj rimedoj de Esp. eduko.

Li pravas, kaj mi plenumas lian peton. Sed certe, ke kuvena programo de Junularo Lanškroun ne estas tiu plej efika rimedo de eduko. Pro tio mi malformas diskutadon je temo „Junulara kunveno kaj ĝia programo“. Skribu ĉiuj al la redakcio. J.W.

Jen unu programo:

1. Kantado de konataj kantoj.
2. Ellerno de nova Esp.kanto.
3. Novaĵoj el Esperanta movado tutmoda, enlaanda kaj loka.
4. Ripetado kaj lernado de la lingvo – legado, rakontado konversacio, skeibtaskoj.
5. Organizaj aferoj.
6. Interesa prelego pri Esperanta temo aŭ le faka prelego aŭ kiu ajn alia. /Esperantlingva /. Kelkaj temoj: Historio de internacia lingvo, E.literaturo, E.gramatiko, Praktika uzado de E., Aviado, Atomfiziko, Duonhoro de bonhumoro, La ekskurso ktp. / 15 min. /

d / Kie kaj kiam okazos la venonta kongreso?
e / De kiu eskribita la „Blanka malsano“?
f / Kiu skribis libron „Urbo sub signo de fajro“?
g / En kiu lando aperas gazeto „Heroldo de Esperanto“?
h / Kiuj estas nomoj de cirkuleroj eldonataj en Praha, Gottwaldov, Poprad, Lanškroun?
i / Kio estas antracito?
j / Kiom eksplodis la atombombo en Hirôŝima?

Resp.: a / En Bialystok, b / ĉiujare, c / En Boulogne sur Mer-Francio 1905, d / Oslo 1952, e / Karel Čapek, f / Marie Majerová, g / En Nederlando,

7. Demandoj. Ĉiu devas respondi skribe kaj gvidanto poste ellaborojn poentas. Ekz:

a / Kie naskiĝis D-ro L.Zamenhof ?

b / Post kiu periodo estas aranĝata Universala Esperanto Kongreso?

c / Kie kaj kiam okazis la unua Univ. Kongreso?

h / „Vokas vin Praha“, „Junularo, agu!“, „Juna Voĉo“ kaj „Esperanta Vorto“, i / Karbo,

j / La 6-an de aŭgusto 1945.

8. Ludoj. Ekz.: Telefono, Ludantoj sidas ronde kaj unu komencas telefoni – flustre diras iun Esp. frazon en orelon de sia dekstra najbaro, tiu faras sama ktp. Lasta Ludanto diros laŭte ridindan rezulton.

Jen ESPERIGAJ VORTOJ el pensoj de nia majstro D-ro L.L.Zamenhof:

„La afero Esperanto, nia etika movado, konsistas ne en rapideco, sed en certeco. Multe da sencelaj aferoj ekbrilis antaŭ la mondo rapide, sed ankaŭ rapide falis. Afero bona kaj certa progresas ordinare malrapide kaj nur kun grandaj malhelpoj. Ne malĝoju tial, Esperantistoj! . . . Ni laboru kaj asperu!!“

ESPERANTA MUZEO

Dum majo 1982 estos malfermita Esperanta muzeo en Kopřivnice. Konvenan materialon bonvolu sendi al: Rudolf Zanáška, Jiráskova 442, K o p ř i v n i c e .

ESPERANTA SEMINARO

De la 17-a de februaro ĝis la 6-a de aprilo tj. okazos en OLOMOUC Esp. Seminaro / 5-foje - ĉiam dimanĉe je 8.30 /. Parolos J.Vítek, prof.Kožený, PhDr.Pitlík, R.Hromada, Ing.Krajíc. Informojn postulu ĉe: Dr. Vlad.Mohapl, tř. Svornosti 4, Olomouc.

RESPONDI DEZIRAS

50 kursanoj kaj anoj de Junularo, Lanškroun deziras kor. ktm. Skribu al: Esperanto Rondeto, Palackého 729, Lanškroun, ČSR.

---

Pro diversaj malhelpoj kun la preso ni dume ne povas eldonadi la cirkuleron pli amplekse.

---

! Cirkulero ESPERANTA VORTO aperas laŭ bezone. - Senpaga. !
! ADRESO: Esperanta – Rondeto, Palackého 729, Lanškroun, ČSR. !

---

ESPERANTO - RONDETO
LANŠKROUN
ČSR




ESPERANTO
JAZYK ZÍTŘKA